


## La 30an de aŭgusto 2014

### La tribunalo agnoskis, ke sinmortigo okazis pro la nuklea akcidento

La distrikta tribunalo de Fukuŝima verdiktis, ke TEPCO pagu 49 milionojn da enoj (490 mil eŭroj) kiel kompenson al s-ro Ŭatanabe Mikio 64-jara, kies edzino Hamako mortigis sin post la nuklea akcidento.



La familio Ŭatanabe translokiĝis de sia hejmo en la urbeto Kaŭamata al apartamento en la urbo Fukuŝima en junio 2011 pro la nuklea akcidento. Poste ŝi suferis pro sendormo kaj maldikiĝo. Tri semajojn poste ili provizore revenis hejmen por tranokti unu nokton. Vespere ŝi estis trovita morta bruligite per benzino.



La verdikto diras: « Hamako loĝis en la distrikto Jamakija de la urbeto Kaŭamata dum 58 jaroj, kaj volis loĝadi tie, kultivante legomojn kaj florojn, sed la nuklea akcidento abrupte rabis al ŝi tiun vivon. La familio perdis sian laboron de kokina bredado kaj ŝi devis loĝi en malgranda apartamento. Ŝi ne povis alkutimiĝi al tiu nova vivo kaj fariĝis melankolia. Kiam ŝi revenis hejmen, ŝi sentis malesperon pro la rifuĝa vivo kaj elektis sinmortigon en la distrikto, kie ŝi naskiĝis kaj kreskis ».

TEPCO insistis, ke Hamako estis mense malforta, sed la tribunalo konstatis, ke la sinmortigo kaj la nuklea akcidento havas kaŭzecon. S-ro

Ŭatanabe Mikio diris: « Hamako nun restu pace en la ĉielo. TEPCO akceptu la verdikton kaj petu pardonon de mi ».

S-ino Vanessa Kanno 36-jara, kiu ankaŭ akuzis TEPCO-n en la lasta majo, diris : « Tiu verdikto kuraĝigas min. Mi plu batalos por mia edzo ». Ŝia edzo, laktofabrikisto 54-jara, mortigis sin tri monatojn post la nuklea akcidento, skribinte testamenton sur la muro de la bovinejo « Se ne okazus la nuklea akcidento, ... ».

Tiu verdikto estas granda venko por la suferantoj en Fukuŝima, kaj ili esperas, ke ĝi influos aliajn kazojn, do certe TEPCO apelacios, do la batalo de s-ro Ŭatanabe plu daŭros.

## 57 infanoj suferas pro tiroida kancero

La Komitato pri sanekzamenado de la gubernianoj de Fukuŝima publikigis rezulton de la enketo inter 370 mil gejunuloj, kiuj estis pli junaj ol 18-jaraj, kiam okazis la nuklea akcidento en 2011. La Komitato jene klarigas :

(1) La nombro de suferantoj kaj eblaj suferantoj

Suferantoj pro tiroida kancero : 57 personoj

Eblaj suferantoj pro tiroida kancero: 46 personoj

(2) Proporcioj de la suferantoj laŭ la regionoj

Neloĝebla distrikto (13 urbetoj) ĉirkaŭ la nuklea centralo n-ro 1:


0,034%

Hamadoori (laŭ la pacifika marbordo krom la ĉi-supraj urbetoj):

0,035%

Nakadoori (enlanda regiono) : 0,036%

Aidu-regiono (montara regiono) : 0,028%



La komitatestro s-ro Hoŝi Hokuto diris: “Ne troviĝas diferenco de procentoj de la suferantoj inter la regionoj, do oni povas konkludi, ke ne ekzistas kaŭzeco inter la kanceriĝo kaj la nuklea akcidento. Pri la regiono Aidu la nombro de la ekzamenitoj estas pli malgranda ol en aliaj regionoj, kaj kiam la ekzamenado finiĝos, la diferenco plimalgrandiĝos”. Laŭ la esploro de la ministerio de medio, la procentoj de tiroida kanceriĝo en aliaj gubernioj estas similaj kun tiu de Fukuŝima.

(Laŭ la ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo, la 25an de aŭgusto 2014)

Tamen mi havas dubojn pri tiu rezulto :

1. Laŭ la Ŝtata Kancercentro, el ĉiu unu miliono da gejunuloj en siaj 10aj jaroj aperas 1~ 9 suferantoj pro tiroida kancero. En Fukuŝima 54 (+46) suferantoj aperis el 370 mil gejunuloj. Se estus unu miliono da gejunuloj en Fukuŝima, aperus 146 (124) suferantoj. La Kancercentro diras, ke neniam antaŭe oni ne esploris tiel grandskale kiel en Fukuŝima pri suferantoj de tiroida kancero, tial la komparado estas malfacila.

Tamen la nombro de la suferantoj en Fukuŝima estas tro granda.

2. Ĉu vere la procento de Aidu proksimiĝos al tiuj de aliaj regionoj? Aidu situas tre fore de la nuklea centralo, do eĉ tuj post la nuklea akcidento, radioaktiveco ne estis tiel forta kiel en aliaj regionoj. Mi vidas grandan diferencon inter la ciferoj 0,028 kaj 0,034~0,036. Ĉu tiu diferenco ne evidencigas la influon de radioaktiveco sur homan korpon ?

3. La Komitato ne klarigis la nombron de la suferantoj laŭ la sekso. S-ro Macuzaki Miĉijuki, kuracisto, skribis en la revuo “Scienco” (marta numero de 2014) eldonita de la eldonejo Iŭanami : « Junulinoj 2~6-oble pli multe suferas pro tiroida kancero ol junuloj. En Fukuŝima gejunuloj samproporcie suferas, samkiel en Ĉernobil. Tio povis esti influo de la nuklea akcidento ».

4. En la ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo la 17an de aŭgusto aperis unu-paĝa granda reklamo de la ŝtato : “Havu ĝustan scion pri radioaktiveco”, en kiu s-ro Nakagaŭa Keiĉi (asista profesoro de la hospitalo de la universitato

Tokio) kaj Lethy Keeth Chem (literumado de lia nomo ne estas certa, eksa fakestro de sano en IAEA). Nakagaŭa diras: «Tro da nervoziĝo pri radioaktiveco malbonigas vivadon kaj pligrandigas riskon de kancero » kaj « Ne multiĝos kancero kaŭzita de radioaktiva elmetiĝo en Fukuŝima », kaj Chem diras: « Agu laŭ la scienca normo fiksita de internaciaj organizoj ».

Ŝajnas al mi, ke la registaro provas kaŝi danĝeron de radioaktiveco por plu uzi atomenergion. Ŝajnas al mi, ke ankaŭ tiu rezulto de la Komitato sekvas la vojon de la registaro.

## **Konsisto de energifontoj en Japanio**

Al mia antaŭa raporto venis demando pri la konsisto de energifontoj en Japanio. Jen estas respondo :

### **En 2010 (antaŭ la nuklea akcidento), en 2013**

Vapor energio :	61,8%	88,4%
Atomenergio :	28,6%	1,0%
Akva energio :	8,5%	8,5%
Aliaj :	1,1%	2,2%

(La sumo de la ciferoj en 2013 ne fariĝas 100 pro traktado de malgrandaj ciferoj.)

Japanio havas altan teknikon pri reaktoro de vaporenergio. La plaj nova reaktoro povos ŝpari petrolon je 20%. Multaj elektraj kompanio nun produktas elektron per malnovaj reaktoroj kaj volas (laŭ mi « voletas » aŭ nevole) anstataŭigi ilin per novaj, sed la financa problemo (kaj ankaŭ « antaŭvidataj baldaŭaj » refunkciigo de nukleaj reaktoroj) bremsas tiun movon. TEPCO planas konstrui du 500 000-kilovatajn vaporenergiajn reaktorojn en Fukuŝima kiel simbolojn de restarigo de Fukuŝima, (ĉar, laŭ mi, ĝi ne povas facile antaŭvidi refunkciigon de siaj nukleaj centraloj).

## **La registaro aĉetos la terenon por konservi poluitan teron**

La 29an de aŭgusto la gubernio Fukuŝima decidis akcepti la registaran proponon pri la tereno por konservi poluitan teron.

Ĉiu en Fukuŝima troviĝas montoj da sakoj da poluita tero. Oni ne povas

senpoluigi ĝin, do la unusola rimedo estas konservadi ĝin ie, kaj la registaro proponis fari la konservejon en la urboj Ookuma kaj Futaba, kie estas tiuj detruitaj reaktoroj. Por aĉeti terenon por la konservejo, la registaro proponis 85 miliardojn da enoj kaj la gubernio 15 miliardojn da enoj (sume 100 miliardojn da enoj, 1 miliardoj da eŭroj) kiel kompensan monon al ambaŭ urbetoj. Ambaŭ akceptos tiun proponon. Sekve la loĝantoj en tiuj urboj eterne perdos sian terenon kaj esperon reveni hejmen. La registaro promesas, ke post 30 jaroj ĝi transportos la teron ekster la gubernio kaj finforĵetos ĝin, sed neniu kredas, ke troviĝos tiuj, kiuj akceptos ĝin.

Fine mono parolis !

**HORI JASUO**